OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

# Sennaciulo




## FINIĜIS NIA 80-A !

Detalojn kaj fotofilmon vi trovos interne.

Sennaciulo, julio-aŭgusto2007, n°7-8 (1225-6),MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442, prezo 5 €

# 80-a SAT-kongreso - Parizo (Antony)

**fotofilmo**




*La kongresejo ekstere*



*Akcepto de kongresanoj*



*K-doj Schram kaj Mramba Simba*



*Belega libroservo de SAT-Amikaro*



*Dum interkonatiĝa vespero*



*Unua laborkunsido*




*Komuna fotado*



*Detalo de la maldekstra foto*



*Vizito al hejmo de handikapuloj*



*Prelego de k-do Mramba Simba*




*Dum laboro en komisionoj*



*En pariza metroo*



*Frederiko klarigas pri SAT-TTT*



*Lino Markov kaj Joan Ribalta*



*Adiaŭa vespero - Jomo Ipfelkofer*

Karaj gekamaradoj,

ĵus pasis nia 80-a Kongreso kun granda sukceso. Ni multe laboris, diskutis, instruiĝis kaj amuziĝis. La resumon pri la kongreso vi povas legi en tiu ĉi numero kaj la detala raporto pri la kongresaj laboroj baldaŭ estos legebla en niaj retpaĝoj : *http://www.satesperanto.org/*.

Dum la kongreso oni diskutis ankaŭ pri Sennaciulo, ĝia aperritmo kaj plilarĝigo de la Redakta skipo. Ĝis la fino de la jaro la aperritmo ne ŝanĝiĝos - ĝi restos monata. Pri la venonta jaro decidos la Plenum-Komitato interkonsente kun la Redakta skipo.

Estas dezirinde ke la Redakta skipo plilarĝiĝu. Ni bezonus skipanojn el diversaj landoj, kiuj estas pretaj aktive labori por plibonigo de nia organo. Dum la kongreso oni aŭdis laŭdojn pri la novaspekta Sennaciulo kaj ĝia enhavo. Multaj esprimis kontenton pro la regula apero de dosieroj, kion ni intencas daŭrigi. Apude vi trovas la temojn de venontaj dosieroj kun la limdatoj por sendo de kunlaboraĵoj kaj la nomojn de respondeculoj. Krome vi povas sendi viajn kontribuaĵojn al la adreso de la SAT-sidejo kiu zorgos pri la transdono de ĉio al la Redakta skipo. Uzu la retadreson : *satesperanto@free.fr* aŭ la stratadreson de la sidejo: *SAT, 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris*.

Kun tiu ĉi numero de Sennaciulo vi ricevas ĝian suplementon, la ĉi-jaran Sennaciecan Revuon. Jen multe da legaĵo por la fino de la somero. Sed ni devas tuj prepari la septembran Sennaciulon. Do, sendu tuj materialon kaj tekstojn por la dosiero, tiel ke la gazeto povu aperi ĝustatempe kaj ke ni retrovu la normalan aperritmon. Dankon.

Kamaradece al ĉiuj,

La redakta skipo

# Niaj venontaj dosieroj

Jen la temoj de dosieroj por du venontaj monatoj:

**Septembro**: “Etika vivo” aŭ ĝis kiu grado eblas funkcii nekapitalisme en kapitalisma mondo?

Respondeculo: Vinko Markovo, *vinkomarkov@yahoo.fr*
Kontribuoj sendotaj antaŭ la 20a de aŭgusto.

ooo

**Oktobro**: “Handikapuloj”


Respondeculo: Gerardo Lieblang, *lieblang.gerard@neuf.fr*
Kontribuoj sendotaj antaŭ la 15a de septembro. K-do Lieblang atendas informojn pri la situacio de handikapuloj en diversaj landoj.

---

Dum la kongreso aperis pluraj eldonaĵoj de SAT kaj de SAT-Eldona Fako Kooperativa - ĉiuj mendeblaj ĉe SAT:




**"Ĉu ili diras al ni la veron?"** - libro pri la nordkoreiaj retenejoj pri kiuj atestas pluraj eksmalliberuloj el tiuj retenejoj, kiuj sukcesis fuĝi al Suda Koreio. Iliaj raportoj havas multon komunan, kvankam ili ne konis unu la alian kaj ne sciis pri aliaj raportoj, kiam ili rakontis la siajn. Tre kortuŝa libro pri la agoj kontraŭ la homaro.
Prezo: 12 € + afranko.




**"Mortopuno"** - faktoj kaj dokumentoj pri la puno daŭre aplikata en multaj landoj de la mondo.
Prezo : 8 € + afranko










**"Glumarkoj"** - tri specoj.
Prezo : 10 ekz = 1 €
100 ekz. = 7 €
+ afranko.

Sennaciulo
OFICIALA ORGANO DE S.A.T
Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39 - BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
Redakta Komitato - Cyril Orsingher,Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Vito Markovo, Nikolao Gudskov, Gary Mickle, Jacques Schram, Jomo Ipfelkofer. Provizora ĉefredaktoro kaj enpaĝigisto: Krešimir Barković.
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
9 771163 044279
❒
Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas monate - Mensuel. Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567